

# LA JUNA VIVO

MONATA ORGANO  
POR LA

JUNULARO KAJ  
KOMENCANTOJ



Redakcio kaj Administrado:  
West-Graafdiijk (N.H.)  
Nederlando.  
Gironumero 209354 Nederlando.  
Tel. 10

Jarabono:  
Nederlando: 0.75 guldeno  
Aliaj landoj: 1 guldeno  
(1 gid. = 2,1 Sv. fr. aŭ 10 fr. fr.)

Por progresintoj.

## AHMED, LA REVULO.

Selim estis la amiketo de Ahmed. Antaŭ du jaroj ili loĝis kune en unu granda domo en la Turka kvartalo de la urbo Alexandrië. Ĉiam ili estis kune. Selim neniam sen Ahmed. Ahmed neniam sen Selim.

Selim estis malgranda kaj gracia, milda kaj modesta. Ahmed granda kaj forta, pasia kaj ambicia.

Ambaŭ amis unu la alian tiom, kiom amiketoj povas sin ami. Sed tamen, la amikeco de Selim estis pli granda, ĉar — li pensis neniam pri si mem. Li multe fieris pri sia forta amiko Ahmed. Neniu povis remi kiel li; kiel birdo li flugis trans la golfeto per sia boato; pli rapide ol la vento li rajdis per sia kamelo tra la ebenaĵo.

„Li estas mia amiko, mia plej bona amiko,” Selim pensis fiere, kaj sekvis Ahmed ĉien kiel lia ombro. Kaj ofte venis samtempe la penso: „Kiel estas eble, ke tiu lerta Ahmed elektis min kiel amikon; mi ne komprenas, kion mi signifas por li.” Li deziris esti tiel forta kaj energia. Kaj iufoje li demandis al Ahmed: „Diru, kial fakte vi amas min?” Kaj tiam Ahmed iom ridis, kaj rigardis lin en la fidelaj okuloj kaj diris: „Kial, kial? Nu, ĉar vi estas Selim.”

Nu jes, sed volonte Selim estus iom alia, pro sia amiko.

Iun tagon diris la maljuna Bajazet, la avo de Selim, al li: „Selim, mi aĉetis kamelon kaj nomis ĝin Kosva, laŭ la amata kamelo, sur kiu nia granda profeto Mahometo enrajdis Mekka. Mi donas al vi Kosva, kaj vi lernu rajdi sur ĝi kiel via amiko Ahmed.”

Tiam Selim ĵetis sin sur la kolon de la maljuna Bajazet kaj ek-

kriis: „Kara avêjo, mi penos fariĝi bona rajdanto. Nur tiam Ahmed vere povos min multe ami.”

La kompatinda Selim! Li ne supozis, ke ĝuste Kosva fariĝos por li malfeliĉo.

Kaj nelacigeble li ekzercis la rajdadon, kaj tenis sin brave kaj sentime, malgraŭ ke Kosva ofte lin deĵetis. Sed Selim persistis. Ĉiam li havis antaŭ la okuloj la tagon, kiam li al Ahmed diros: „Ahmed, ni sammomente forrajdu de ĉi tie per niaj kameloj, kaj vi vidos, ke ni samtempe alvenos ĉe la fino.”

Tiam li estos ĝuste tiel bona rajdanto, kiel Ahmed, kaj ĉi lasta povos ankaŭ fieri pri li, kaj pli multe lin ami, eble eĉ tiom, kiom li amas Ahmed.

Kaj venis tiu tago. Ahmed kaj Selim ekrajdis sammomente. Kiel sagoj el arko ili flugis tra la ebenaĵo kaj Selim ekstreme sin streĉis por resti apud Ahmed. Ili restis apudaj, ĉiam apudaj —, ĝis ioma distanco antaŭ la fino. Tiam Kosva subite preterflugis —, kaj Selim venkis.

Plenĝoja kaj brilokula li atendas sian amikon. Nun Ahmed povas fieri pri li. Sed — Ahmed, kiu kutimis esti la unua en ĉio, esti drolotata, admirata, kaj indulgata, unualoke de Selim, ne estas ĝoja, nek fiera pri li. Liaj okuloj flamas pro kolero kaj li ĵetas minacan rigardon al Selim.

Ho, tiu malgranda, malforta Selim superis lin! Al li, la plej bona rajdanto el la kvartalo la krono estas forŝirita, forrabita de Selim! Ne, tion li ne povas toleri! Li amis Selim senmezure, kiu kuraĝus kontraŭdiri tion! Sed — li, Ahmed estu la unua. Lia ambicio estas vundita, kaj subite li ĵaluzas pasie kaj senbride.

Kaj Selim, kiu atendis ne ĉi tion, estas tute konsternita kaj rigardas la vizaĝon de sia amiko per larmaj okuloj, kaj diras nun: „Ho, Ahmed, mi multe bedaŭras. Mi tutalia prezentis ĉion al mi.”

La pasia Ahmed, tute ekster si mem pro kolero, krude forpuŝas lin: „Kion, vi bedaŭras?! Hipokritulo! Tion mi tute ne kredas.”

Kaj samtempe kun la ĵaluzo, la malfido kaj la suspekto vekigis en li. „Tion Selim diris nur por moki lin, kvazaŭ li ne komprenas tion.”

De post tiam ne estis bone al Ahmed. La diableto de suspektemo kaj malfido enŝteliĝis en lian koron. Li ne plu fidis al Selim. Ĉion, kion Selim faris, la diableto misklarigis kaj ĝi enflustris al Ahmed: „Ne kredu lin, li volas logi vin en kaptilon, same kiel antaŭe pri

la kamelkonkuro. Li tiom longe toleris vin super si; nun li ne plu volas tion. Li deziras superi vin. Li estas falsa.”

Kaj kelkfoje Aĥmed furiozis kontraŭ la diableto kaj kolere kriis: „Kion, vi diras malbonon pri mia amiko, pri mia Selim? Mi ne toleras tion. Selim estas bona kaj fidela,” kaj tiam li batalis kontraŭ la diableto, sed ĝi nestiĝis en lia karno kaj koro.

Malfeliĉa, vundita Aĥmed. Li ne povis venki ĝin. Eĉ ne li, tia forta, vigla knabo. Jes, liaj muskoloj ankoraŭ estis fortaj, sed lia koro ne plu estis sana kaj senmakula, la ĵaluzo malsanktigis ĝin. Kaj li sovaĝe forrajdis sur la kamelo tre malproksimen, por ne aŭdi la diableton, sed ĉiam ĝi pikis kaj incitis lin, ĉiam.

Kaj ĝi turmentis kaj torturis lin tiom forte, ke iun vesperon ĉirkaŭ sunsubiro, kiam li vidis Selim alveni sur Kosva, li subite freneze ekkoleris. Li prenis grandan ŝtonon kaj ĵetis ĝin al li. Kosva faris pro ektimo subitan eksalton, deĵetis Selim, piedpremis lin sur la brusto, tiel ke le sternumo rompiĝis kaj Selim kuŝis morta ĉe la piedoj de Aĥmed. Mortigita de Kosva kaj de sia Aĥmed.

Dum momento li ankoraŭ malfermis la okulojn kaj diris rigardante al Aĥmed: „Oh, Aĥmed — mi amis — tiom — multe —.”

Tiam li mortis, en la lumo de la subiranta suno. Kaj Ahmed frapis al si senespere la kapon kaj la bruston. „Selim, mia karega Selim,” li ploris, genuante apud li, „mia sola amiko.” Ho, estis terure, ne tion li estis celinta. Oh, Alaho sciis.

Ne, ne li volis, sed la diableto, kvankam ĝi zorge kaŝis tion antaŭ li. Tiel ja agas diableto.

Kaj de post tiu tago Ahmed neniam plu estis gaja, kaj oni nomis lin Aĥmed la revulo.

Neniam plu li sidis en sia boato. Ne plu interesis lin bele remi, ĉar Selim ne staras sur la bordo por admiri lin. Sian kamelon li por ĉiam adiaŭis. La tutan tagon li sidas en sia vendobudo kaj legas la koranon. Ne plu interesas lin, kio okazas en lia kvartalo, ĉar nenie li trovas la fidelajn okulojn de Selim, kiuj tiom ĝojradie povis rigardi lin. La okulojn, el kiuj li mem forprenis la vivoardon. Ĉiuvendre li iras al la tombejo por alporti por sia amiko manĝaĵon kaj rozoakvon. Li ankoraŭ neniam preterlasis tion.

Trad: VANE.

---

La venonta numero de „L. J. V.” aperos la 28an de Majo.

## LA NASKIGTAGO.

(Teatraĵo triakta).

Personoj:	La patro		Mia, filineto
	La patrino		Johano
	Marten	} filoj.	Rika
	Leo		Lina
			} geknaboj.

## Prologo

*(Alia infano venas antaŭ la kurteno kaj diras):*

Karaj gesinoroj, mi volas peti vin,  
 Ke vi dum momento aŭskultu min;  
 Estu do silentaj kaj akceptu de mi:  
 Hodiaŭ ni prezentos teatraĵon al vi.  
 Sed longan ne, kiam ni komencas do,  
 Jam baldaŭ la fino alvenas, ho;  
 Per ĝi vi tamen instruiĝu:  
 Ke oni ĉiam bone organizu;  
 Ĉar se vi, homoj, tion do forgesos,  
 Plej bona plano certe malsukcesos.  
 Por ke tro longe vin ne tedu mi,  
 Finfine komunikas, ke estas aktoj tri.

## UNUA AKTO.

*(La scenejo prezentas ordinaran ĉambron. Malgranda tablo kun seĝoj staras flanke; granda spaco en la mezo.**La patrino flikas ŝtrumpojn ĉe la tablo, granda korbo kun ŝtrumpoj sur ĝi).*

*Patrino (rigardas la horloĝon):* Jam post la dekdua. La mateno rapidege pasas. Tuj la infanoj venos el la lernejo. Al mia kvieto venis fino. Ho, jes, multan laboron, multajn zorgojn, sed mi ne deziras malhavi ilin. *(flikglobo en ŝtrumpon, granda truo vidiĝas)* Ho, Marten piedpilkludis. Ĝin mi ne povos ripari antaŭ la lunĉo .....

*Leo (enkuregas, ĉirkaŭbruas en la ĉambro):* Hura, hura! Ankoraŭ unu semajno! Mi frenezas pro plezuro, ne scias kion fari pro ĝojo.

*Patrino:* Iom trankvile, mi petas. Unue purigu la piedojn. Tiel.

Eksidu nun kviete ĉe mi kaj rakontu, kial vi tiel bruas.

*Leo:* Kiel mi povus sidi kviete, kiam mi estas preskaŭ freneza. Post unu semajno ja mi havos la naskiĝtagon??

*Patrino:* Ni vidu ..... lundon, mardon ..... jes, vi pravas, jam post unu semajno! Mi devas do pensi pri la donacoj! Ĉu estas deziroj ĉe vi?

*Leo:* Jes — ne ..... tamen jes. Eble jes ..... (*li nomas, pli kaj pli rapide*): Stilzoj kaj skolta tranĉilo kaj fontplumo kaj fotilo kaj elektra lanterno kaj piedpilko kaj dorsosako kaj kompasoj kaj paŝteloj kaj notlibreto kaj cirkelo kaj lupeo kaj du viŝgumoj kaj monujo kaj libro kaj libro kaj ankoraŭ libro.

*Patrino:* Ne malmulte. Nu, mi pripensos.

*Leo (ĉirkaŭdancas):* Kaj mi invitos la tutan klason por ludi; kaj mi regalos ilin, kaj la avo kaj avinjo venos, ankaŭ ili donos ion, kaj estos glaciaĵo kiel deserto kaj post unu semajno mi festos la naskiĝtagon! (foriras)

*Patrino:* He, he, bruemulo.

*Marten (envenas legante):* Kial li tiel frenezas?

*Patrino:* Ĉar post unu semajno li havos la naskiĝtagon.

*Marten (ĉiam legante):* Duonfrenezulo. Ĉu ni devas ion donaci, aŭ ĉu ne estas necese?

*Patrino (ordigante la ŝtrumpojn, k.t.p.):* Li parolis pri stilzoj kaj ankoraŭ multe pli, li ĉion foje surskribu. Nu, mi pretigos la buterpanojn. (foriras)

*Marten (legas, genuante antaŭ seĝo, kubutoj sur ĝia sidparto; silento).*

*Rika (envenas):* Ha, Marten! (*silento*) Ha, ĉu vi estas surda! (*silento*). Nu do, aŭskultu min. (*skuas lin*)

*Marten (legante):* Nu, kio?

*Rika:* Ĉu vi scias deziron de Leo por lia naskiĝtago?

*Marten (legante):* Jes ne ..... nu tamen, stilzojn, mi kredas, kaj .....

*Rika (interrompas):* Nu bone, legu vi, mi ja vidos. (*foriras*)

*Marten: (legas, silento).*

*Johano (envenas):* He, halo! (*silento*) Ĉu vi ne aŭdas? (*silento*,

*Marten profunde legas*) Ho, diable, ĉu vi ne povas aŭskulti min?

(*Renversas lin, ili luktas*).

*Marten:* Lasu tion, entrudulo, lasu min legi. Ĉesu. Aŭ vi ricevos baton, ke vi vidos steletojn.

*Johano:* Unue vi aŭskultos min, malafablulo. (*Marten ree legas*).

Petro estas malsana kaj mi devas demandi por la patrino, kion donaci por la naskiĝtago de tiu Leo, via frato. Mi donacus pendseruron por lia buŝo, sed ŝajnas, ke tio estas tro multekosta. He, surdulo, ĉu vi aŭskultas?

*Marten (legante)*: Leo? Naskiĝtago? Ho jes ..... eh ..... pendseruro? Kion vi diris? Eh ..... ne, stilzojn. Nu, lasu min legi!

*Johano*: Al la diablo kun via legado. Nu, mi jam iras, Bonan! (*foriras*). (*Marten legas silento*).

*Lina (envenas)*: Ha, Marten, Leo krias de la tegmentoj, ke li post unu semajno havos la naskiĝtagon, mi certe estus forgesinta. Mi volas demandi vin, ĉu estus bone donaci al li stilzojn, li neniam povas kunludi, kiam ni stilziras, ĉu ne bona ideo?

*Marten (legas)*: Jes. *Lina*: Ĉu vi aŭdis, kion mi diris?

*Marten (legas)*: Jes. *Lina*: Ĉu ne bona plano?

*Marten (legas)*: Jes. *Lina*: Nu, saluton!

*Marten (legas)*: Jes. (*Lina foriras, Marten legas, silento*).

*Mia (envenas)*: Marten!

*Marten (eksaltas, tutatenta, metas brakon ĉirkaŭ sia fratineto)*: Kio estas, mia eta trezoro?

*Mia*: Ĉu Leo baldaŭ havos la naskiĝtagon?

*Marten*: Jes, post unu semajno.

*Mia*: Ĉu ni kune donacu ion al li?

*Marten*: Li estas idiota bubo, sed ni malplenigos niajn ŝparuojn kaj oferos niajn lastajn monerojn, kaj ni kune aĉetos paron da stilzoj por li, ĉu bone, Mia?

*Mia (manfrapas)*: Jes, jes, stilzoj, tio estas bona! (*ambaŭ foriras*).

## DUA AKTO.

(*Tri tagojn poste. La sama scenejo. Leo segas sur la planko longan lignolaton; ĥaoso da ligno, segaĵo, ĉarpentilaro ĉirkaŭ li*).

*Leo*: Ha, ha, mi progresas. Tamen, tre malfacila laboro. Sed mi havos ja plezuron per miaj stilzoj. Je mia naskiĝtago mi certe ne ricevos stilzojn, mi havas tiom multegajn dezirojn, mi mem do jam faras ilin (*segas*). Tamen, tre malfacila laboro, sed mi sukcesos. Cetere mi estas scivola, kion mi ricevos. Ho, rave, jam post kvin tagoj!

*Marten (envenas legante, duonfalas pro la ligno)*: Idioto, ĉu mi rompu la nukon?

*Leo:* Nu, atentu do.

*Marten:* Mi atentas ja. Kion vi faras?

*Leo:* Nenion.

*Marten:* Mi kredas! Prefere prenu libron, kaj legu: tio ne faras malordon.

*Leo:* Nu, ni ne tiel kverelu, kion ni gajnas per tio? Mi faras ion tre belan, poste vi vidos. Mi ankoraŭ ne diras **kion**, sed vi havos plezuron per ĝi, kiam ĝi estos preta.

*Marten:* Nu, mi scivolas; sukceson! (*foriras legante*)

*Leo (segas):* Estas granda laboro, kaj mi havas ankaŭ grandajn lernejtaskojn, nune. Eble mi havos ilin pretaj je mia naskiĝtago. Jes, estus bone, mi povos ilin donaci al mi mem!

*Patrino (envenas, iom kolera):* Sed knabo, kia ĥaoso! Kion vi faras?

*Leo:* Mi segas.

*Patrino:* Tion mi ja vidas. Kion vi segas?

*Leo:* Lignon.

*Patrino:* Ankaŭ tion mi vidas. Sed kio ĝi fariĝos?

*Leo:* Io alia el ligno.

*Patrino:* Nun ne plu plaĉas al mi. Prenu rapide tiujn aĵojn, kaj portu ĉion al la subtegmento. Ŝajnas, ke vi frenezas, fari tian malordon en la ĉambro!

*Leo (obeeme):* Jes, patrino. (*foriras kun la aĵoj*).

*Patrino (prenas papereton el sia mansaketo, legas, pripensas):*  
Fakte mi trovas plej bone stilzojn, nun estas preskaŭ somero, li estos ofte ekstere. Kaj ne tro multekosta. Mi vidos, ĉu mi aĉetos ilin!

### TRIA AKTO.

(*Kvar tagojn poste. La sama ĉambro, ornamita per floroj kaj girlandoj. La patrino, la patro, Marten kaj Mia staras en vico; la gepatroj tenas paron da stilzoj. Leo envenas, ridante kaj gravmiene*).

*Patro, Patrino, Marten, Mia (kantas).*

Longe li vivu, (2 ×)

Longe li vivu en plej granda honor'

En plej granda honor' (2 ×)

Hip — hip — hip — hura!

(*ĉiuj kisas kaj gratulas lin*).

*Patro*: Nu, Leo, granda filo, jen nia donaco, kaj vi havu multan plezuron per ili! (*Li volas doni la stilzojn al Leo, sed samtempe Marten prenas paron el angulo, kie ili estis nevideblaj ..... Li kaj Mia tenas ilin kaj ekstaras antaŭ Leo*).

*Marten*: Tio estas nun iom stranga, ni havas la saman (*ankoraŭ li ne donas ilin, ĉar subite Rika envenas*).

*Rika (kun stilzoj)*: Leo, mi gratulas vin kaj tion mi donacas — ..... (*ŝi ankoraŭ tenas ilin, ĉar envenas Johano*).

*Johano (kun stilzoj)*: Bonan, mi venas anstataŭ Petro, li ankoraŭ malsanas, jen lia donaco ..... (*li ne donas, ĉar sammomente envenas Lina*).

*Lina (kun stilzoj)*: Mi kore gratulas, Leo, kaj tion mi donacas al vi ..... (*ŝi ne donas ilin ĉiuj staras konfuzite. La patro enrigardas gazeton*).

*Leo*: Nu, mi tre dankas vin ĉiujn, estas tre afable de vi, sed mi devas diri, ke mi mem ĵus pretigis stilzojn ĉi-semajne, ĉar mi pensis, ke mi ne ricevos ilin (*prenas ilin rapide el alia angulo*) do, fakte mi ne plu bezonas tiujn stilzojn de vi.

*Patro*: Ho, knaboj, jen mi legas, ke estas nova polica dekreto, laŭ kiu estas malpermesite iri per stilzoj sur la strato: estas tro danĝere kaj tro ĝene por la preterirantoj. Estas tre domaĝe por vi! *Ĉiuj (faligas la stilzojn, staras mute, la brakoj malstreĉe laŭ la korpo; nur Leo eksaltas kaj krias)*:

*Leo*: Nu, knaboj, tamen ni iros per la stilzoj, ekstere, kaj kiam venos policisto por averti nin, tiam mi diros al li, kial je mia naskiĝtago ni ĉiuj stilziras!

Fino.

### LA Malfelica Kankro!

Senkulpa, kompatinda kankro devojiĝis al Shildburg. Kelkaj urbanoj vidis la fremdan beston, kiom da piedoj ĝi havas, kaj ankaŭ ĝian iron antaŭen kaj malantaŭen. Ili vere timis, ĉar kankron ili vidis neniam antaŭe. Ili tuj alarmis kaj amasiĝis kaj faris multajn konjektojn, kiu monstro ĝi povas esti.

Neniu povis klarigi, ĝis la urbestro finfine diris, ke ĝi estas tajloro, ĉar ĝi kunportas du „tondilojn”. Ili tamen ne estis certaj pri ĉi lasta. Tial la Shildburganoj metis la beston sur pecon da nederlanda drapo, kaj kie la kankro sin movis, tie ili traŝanĝis la drapon. Ili ja kredis, ke la kankro, kiel majstro en la tajlormetio, kreas



modelon por nova vesto. Kaj tiel ili tute fuŝtranĉis la drapon, tiel ke ĝi plu por nenio taŭgis. Nur tiam ili komprenis, ke la kankro nenion scias pri tajlorado.

Nun venis antaŭen iu konsilantarano. Li diris, ke lia plej juna filo havas multajn spertojn, pro tio, ke li dum tri tagoj vojaĝis kun Til Eülenspiegel kaj ĝuste hieraŭ li hejmvonis. Li konas ĉion, kio sin movas en periferio de du mejloj, kaj do, li ne dubas, ke lia filo vidis tian beston, kaj do certe li scias, kiu besto ĝi estas. Kaj pro tio okazis, ke oni venigis tiun knabon en la konsilejon. Longe li rigardis la beston de antaŭe kaj de malantaŭe kaj fakte ne sciis, kie li ĝin povas ekpreni kaj kie fakte estas la kapo. Ĉar oni unue rigardas al la nazo, kaj la nazo devas esti sur la kapo, tial do estis evidente, ke la kankro, kiu povis iri antaŭen kiel malantaŭen, do havas kapon antaŭe kaj malantaŭe.


Fine li diris: „Vere, mi vidis ie kaj tie multajn miraklojn. Sed tian beston mi ankoraŭ neniam vidis. Se mi devas diri, kiu besto ĝi estas, mi diras laŭsperte, ke, se ĝi ne estas kolombo aŭ cikonio, ĝi certe estas cervo, ĉar ĝi ŝajnas posedi kornaron. Sed nepre ĝi estas unu el la tri.”

Nun la Shildburganoj estis ankoraŭ same informitaj kiel antaŭe, kaj kiam unu el ili volis preni la kankron, ĝi pinĉis lin tiom firme per siaj pinĉiloj, ke la vundito kriis pro helpo: „Ĝi estas murdisto, murdisto ĝi estas!”

Kiam la homoj tion vidis, ili ne plu pripensis, sed sammomente ili faris juĝon sur la loko, kie la viro staris, dum li estis mordata. Ili diris jenan verdikton pri la kankro: „Ĉar neniu scias, kiu besto ĝi estas, sed tamen pruvigis, ke ĝi trompis nin aspektante sin tajloro, dum publike pruvigis, ke ĝi estas nur malutila besto, kiu trompas la homojn, eĉ murdisto, tial do ĝi estas juĝata kiel trompisto kaj murdisto; nome: ĝi estos dronigata kun granda malhonoro.”

Sekve unu el la Shildburganoj ricevis la danĝeran komision preni la beston kaj meti ĝin sur tabulon. Tiel li portis ĝin al la granda lageto kaj la tuta komunumo kunmarŝis. Ĉi tie do la kankro estis ĵetata en la akvon en ĉeesto de ĉiuj Shildburganoj. Kiam ĝi sentis sin en sia elemento, ĝi baraktis kaj naĝis malantaŭen. La Shildburganoj kompate rigardis tion, kelkaj eĉ ne povis deteni la larvojn kaj diris plore: „Ho, vidu....., kiom dolora do estas la morto!”

Trad: VANE.



### LA MALSUKCESA BOATVETURO.

Faru verkaĵojn laŭ la supraj bildoj, kaj sendu ĝin antaŭ 15 Junio al: Red. „La Juna Vivo”. Inter la sendintoj de la plej bonaj verkaĵoj ni dislotos du premiojn.

Estas tre rekomendinde rakonti laŭ la bildoj en la grupkunvenoj. Tiel oni facile lernas paroli!

### PREZENTI VERBOJN.

La gvidanto prezentas per gestoj diversajn verbojn, kaj ĉiuj samtempe divenu la vorton. Se oni ne tuj scias la verbon, la gvidanto helpas, dirante ekzemple la unuan literon, la nombron da silaboj, ktp.


La ludeto estas tre taŭga por ekzerci la lernitajn verbojn, kaj do tre utila por kursoj.

## BIRDOJ EN NIAJ ĜARDENOJ.

Laŭ mia sperto neniu birdo kondukas tiom malsame en diversaj lokoj, ol la ruĝgorĝo. Ĉiu konas la ĉarman birdeton, eĉ en la norda parto de Svedujo.

Sveda junulo, kiu regule korespondas kun unu el miaj lernantoj, skribis: „..... En la vintro ni ne vidas la ruĝgorĝon; tiam ĝi restadas en via lando. Sed en la somero ĝi revenas al ni. Ĉu, ĉi tiun someron ĝi alportos al mi viajn salutojn?.....”

Pri la konduto de tiu birdeto la opinioj de birdamikoj estas tre malsamaj. Multaj laŭdas ĝin, pro ĝia fidema karaktero. Mi aŭdis de ĝardenisto, kiu ĉiutage nutris la ruĝgorĝon en sia ĝardeno, ke ĝi sekvis lin ĉien, kaj eĉ eksidis sur la rastilon per kiu li rastis la vojetojn kaj bedojn.



Kutime ili nur vintre alproksimiĝas al ni; somere ili restas en la arbaroj aŭ flugas norden.

Aliaj bird-observantoj asertas, ke la birdeto estas tre tima, kaj nur venas ĉe la domoj, kiam pro la malvarmo ili ne povas trovi sufiĉan nutraĵon.

Kiam mi loĝis en Leiden, la ruĝgorĝo en mia ĝardeno tute fidis min. La unuan fojon, kiam mi metis en la ĝardenon tableton kun manĝaĵoj la birdeto eksidis sur ĝin. Malrapide kaj trankvile serĉante inter la paneroj, semoj, graso, fromaĝeroj, ktp., kaj prenante de ĉiuj frandaĵoj, ĝi restis tie kelkajn minutojn. De temp' al tempo ĝi revenis kaj baldaŭ la paseroj rimarkis, ke ĉiufoje, kiam la ruĝgorĝo estas sur la tableto, kelkaj eroj falas teren. Kompreneble ili prenis tiujn kaj de nun ili tuj alflugis, kiam la ruĝgorĝo aperis. Foje unu el la plej kuraĝaj flugis sur la tableton. Ĝi spertis, ke tie tute ne estas danĝero. Nun ankaŭ la aliaj paseroj kuraĝis veni, kaj fariĝis la ĉiutagaj vizitantoj. Kompatinda ruĝgorĝo! Tuj, kiam ĝi flugis sur la tableton la paseroj forpelis ĝin. Mi do devis elpensi alian ejon por ĝi. Mi havis malnovan kaĝon, pendigis ĝin kontraŭ lignan barilon, malfermis la pordeton kaj ŝutis nutraĵon sur la fundon. Jam post kelkaj minutoj la ruĝgorĝo estis en la kaĝo, kaj trankvile manĝis ĝissate.

Mia servistino diris: „Sinjorino, nun fermu la pordeton, tiam la

ĉarma besteto estos kaptita!” — Ĉu vi pensas, ke mi faris tion? Ĉu mi tiel rekomencus la fidon de mia birdeto?

En la kaĝon la paseroj ne kuraĝis iri, do la ruĝgorĝo havis sian propran manĝejon dum la tuta vintro.

Nun mi loĝas en Wassenaar. Mia ĝardeno estas malgranda kaj ofte saltas katoj en ĝin. Mi forpelas ilin per akvo kaj farigis ĉie altajn barilojn, sed tamen estas de temp’ al tempo kato en la ĝardeno. Bedaŭrinde, ĉar precipe la ruĝgorĝo estas ĉi tie tre tima. Nur, kiam en la ĝardeno ne estas aliaj birdoj kaj ĉio en la ĉirkaŭaĵo estas senbrua, ĝi riskas proksimiĝi, se mi singarde ĵetas ion tra la malfermitan fenestron.

Wassenaar (Ned.)

A. E. S. MICHELSEN.


### SOLVOJ DE LA ENIGMOJ EN NO. 8.

1. Perturbo; 2. ermito; 3. ĉevalo.

La premiojn gajnis: S.ro Overbeek, Amsterdamo, Nederlando; F.ino Ménot, Orléans, Francujo; S.ino Luyting—Vos v. Zon, Zd. Scharwoude, Nederlando.

Premiojn pro verkaĵoj laŭ la bildoj en No. 8 ni sendis al: S.ro Bein, Praha, Ĉehoslovakujo; F.ino H. Steele, Southport, Anglujo; S.ro Lechelle, Parizo, Francujo.


### ENIGMOJ.



a, a, a, a, c, d, e, e, e, i, i, i,  
k, k, k, l, n, n, o, o, o, o, o, o;  
p, p, r, r, r, r, s, s, s, t, t, t.

La vortoj signifas: en la meza vertikala vico — beston; horizontale — literon, konjunkcion, beston, birdon, lingvon, nobelon.

Riga, Latvolando.



a, a, a, a, b, c, d, e, e, e, i,  
l, l, l, m, m, n, n, o, o, o, o, r,  
t, u.

La vortoj signifas: en la meza horizontala vico — beston; horizontale — literon, sufikson, arbon, talismanon, muzikinstrumenton.

B. REICHBERG.

Inter la sendintoj de la ĝustaj solvoj ni dislotos 4 premiojn. Ni akceptos solvojn ĝis 15 Junio.

## MALRIČA, FREMDA KNABO.

(Ĉenkanto por 3 voĉoj)

*Marŝritmo.*

①  $f$ -A 5 | i . i 5 . 5 | 6 6 . 3 |  
 Mal - ri - ĉa, frem - da kna - bo lac-

$b$  E7 A A fis  $b$  E7  
 4 . 2 5 . 7 | i 1 . 5 | i . 3 . | 4 . 2 5 5 |  
 i - ĝis del' mi - gra - do, lac - i - ĝis, del' migrad' lac-

A ② A E7 fis  
 5 . 1 5 | 3 . 4 3 . 2 | 2 i . i |  
 i - ĝis. Li per - dis si - an flu - ton el

$b$  E7 A A A A  
 2 3 4 2 i 7 | i 7 i 2 3 . | i 7 i 2 3 3 |  
 si - a man - tel - poŝ' - poŝ' el

$b$  E7 A ③ A E7  
 3 2 4 2 i 7 | i . 0 5 | 5 . 6 5 . 4 |  
 si - a man - tel - poŝ' ne gra - vas, mi ja

fis D E A  $\bar{A}$   
 4 3 . 3 | 4 5 6 4 3 2 | 3 2 3 4 5 . |  
 tro - vis, tre ki - on ŝa - tis vi la la la

A  $\bar{A}$   $b$  E7 A  
 3 2 3 4 5 5 | 5 4 6 4 3 2 | i . 0 ||  
 la la la la tre ki - on ŝa - tis vi.

Antwerpeno (Belg.)

trad. J. VAN SCHOOR.

## DAŪRIGA KURSO.

## La forgesitaj piedoj.

Sinjoro intencis viziti simplan familion. La virino tamen estis ege **okupita** per lavado de **tolaĵo** kaj tute ne ŝatis akcepti vizitanton. Kiam ŝi vidis la alvenanton, ŝi **kaŝis** sin malantaŭ la vest **lataro** kaj diris al sia filo: „Diru, ke mi ne estas hejme”.

La sinjoro envenas kaj demandas: „Kie estas via patrino?”

„La patrino estas en la vilaĝo por fari aĉetojn”, la knabo respondas.

La vizitanto tamen rimarkas, ke la akvo en la lavkuvo **vapor**iĝas, kaj li ĉirkaŭrigardas ankaŭ al la planko tuj sub la lataro.

„Nu”, li diras, „diru al via patrino, ke ŝi, irante al la vilaĝo, ne plu forgesu ion. Mi kredas, ke ŝi hodiaŭ forgesis siajn piedojn!”

Parizo (Franc.)

LECHELLE.

**B.** Kie fumo leviĝas, fajro troviĝas. — Kiom da kapoj, tiom da opinioj. — Apud plena manĝotablo, ĉiu estas tre afabla. — Kiom da koroj, tiom da voloĵ. — Kion oni volas, tion oni povas. — Kiam kato promenas, la musoj **festenas**.

**C.** Petro trovis pomon sur la vojo. — La pomo estas trovita. — La trovita pomo. La knabo batis la hundon — La hundo estas batita — La batita hundo. La patrino tranĉis la panon — La pano estas tranĉita — La tranĉita pano. La instruisto **punis** la knabon — La punita knabo. La policano **arestis** la ŝteliston — La arestita ŝtelisto. Presita libro — disdonitaj flugfolioj — sendita letero — vendita robo — lavitaj vestoj — **trikitaj** ŝtrumpoj — lernita leciono — faritaj eraroj — legita libro — **inventita** maŝino — harkovrita — nekovrita — skribita — fermitaj pordoj — punita knabo.

I. Lerne parkere la novajn vortojn en A, B, C.

II. Traduku A, B, C, en vian gepatran lingvon.

III. Lerne parkere la proverbojn en B.

IV. Respondu al jenaj demandoj:

Kial la virino ne ŝatis akcepti vizitanton? Kion ŝi faris? Ĉu la knabo rakontis la veron al la sinjoro? Kion li faris? Ĉu la sinjoro fidis al la knabo? Kiel li rimarkis, ke la patrino estas hejme? Kion li diris?

Ĉiu, kiu varbas 5 novajn abonantojn je nia revuo, ricevos donace „La Unuan Jarkolekton” de „La Juna Vivo”. Do multvaloran libron de proksimume 200 paĝoj.

## A. LA UNUA FUMANTO.

Oni rakontas, ke la unua **fumanto** estis riĉa kaj saĝa viro. Ni ne **pritraktu**, ĉu li estis vere saĝa homo. Ni nur scias: Li estis la unua, kiu fumis **tabakon**.

Sed li ne deziris **altrudi** ĉi tiun kutimon al aliaj homoj. Kontraŭe: Li nur fumis, kiam li estis tutsola. Eĉ lia servisto nenion sciis pri tio.

Tamen iam okazis granda domaĝo. — La bona sinjoro vespere sidis en sia ĉambro, pripensis malfacilan problemon kaj fumis el sia granda pipo. Jen li deziris glason da akvo kaj vokis la serviston. Li tute forgesis, ke li devas ĉesigi la fumadon dum la ĉeesto de la servisto.

La brava servisto alportis la akvon kaj eniris la ĉambron. Li ege terurigis, kiam li vidis la fumantan kapon de sia sinjoro. Li vidis, ke el **ties** buŝo kaj nazo eliĝis fumo-**nuboj** kaj tuj li komprenis la aferon. Li **ŝutis** la akvon al la kapo de sia mastro kaj poste li elkuris kaj kriis laŭtvoĉe: „Fajro! Helpu! Mia mastro. Mia mastro tiom multe studis, ke fajro estas en lia kapo. Helpu tuj, jam venas fumo el liaj nazo kaj buŝo!”

Schattendorf (Aŭstr.)

WIESBÖCK.


**B.** Kiu amas la liton, ne akiras profiton. — Pli valoras propra **ĉemizo**, ol fremda, plena **valizo**. — Amiko en ĝojo kaj **ploro**. — Amiko **fidela** estas **trezoro** plej bela. — Ĝis nun neniu plaĉis al ĉiu. — **Forĝu** feron dum ĝi estas varmega.

**C.** Uzu en frazoj: al, anstataŭ, ĉe, apud, sur, laŭ, tra, ĝis, pro, ĉirkaŭ, de, dum, ekster, en, antaŭ, **malgraŭ**, super, el, inter, kun, preter, sen, trans, post, malantaŭ, sub, kontraŭ, pri, **krom**, por, per, da, je, po.

- I. Lerne la novajn vortojn en A, B, C.
- II. Traduku A, B, C en vian gepatran lingvon.
- III. Lerne parkere la proverbojn en B.
- IV. Legu kelkfoje „La unua fumanto” kaj respondu al jenaj demandoj:

Kia estis la unua fumanto? Ĉu la viro prezentis sian kutimon al aliaj homoj? Ĉu lia servisto sciis pri la fumado? Kio okazis iun vesperon? Kial la servisto **verŝis** la akvon sur la kapon de sia mastro? Kion li faris poste?

Ĉiu, kiu nun abonas „La Juna Vivo” ricevos senpage la junian numeron.



### LA SEPA LECIONO.

- |             |                   |               |
|-------------|-------------------|---------------|
| 1. panujo   | 8. sapujo         | 15. balailo   |
| 2. salujo   | 9. raspilo        | 16. hakilo    |
| 3. buterujo | 10. tondilo       | 17. tenilo    |
| 4. laktujo  | 11. korktirilo    | 18. montrilo  |
| 5. sukerujo | 12. polvo-suĉilo  | 19. horloĝo   |
| 6. teujo    | 13. tranĉilo      | 20. kovrilo   |
| 7. piprujo  | 14. fajro-prenilo | 21. ŝovelilo. |

Pipro estas en piprujo.

Teo estas en teujo.

Salo estas en salujo.

Sukero estas en sukerujo.

Kio estas en panujo, laktujo, buterujo, sapujo?

Estas multaj **iloj**: polvo-suĉilo, korktirilo, ŝovelilo, fajro-prenilo, montriloj kaj aliaj.

Oni hakas **per** hakilo, tondas per tondilo, manĝas per manĝilo. La patrino raspas per raspilo. La homoj tranĉas per tranĉiloj. Per balailo oni balaas.

Ni ne povas enpresigi senpagan korespondadreson pli grandan ol 2 linioj. Por ĉiu plia linio oni aldonu 0,30 gld.



## LA KUIREJO.

1. La **kuirejo** estas malgranda, sed **pura** kaj **komforta**. 2. Estas nur unu malgranda fenestro. 3. La kuirejo estas malvarma. 4. La forno ne estas varma. 5. Sur **tiu** forno la patrino kuiras. 6. En la forno **brulas** ligno, karbo kaj **torfo**. 7. La **familio** ne estas en la kuirejo. 8. La patrino estas en la ĉambro kaj **legas**. 9. En la **mateno** ŝi estas en la kuirejo. 10. **Tiam** ŝi kuiras kaj **laboras**. 11. Post la **tagmanĝo** la infanoj ludas en la **strato**. 12. La patro babilas kun la **najbaro**.

- A. Lernu bone la novajn vortojn.  
 B. Kopiu la frazojn en vian kajeron.  
 C. Traduku la lecionojn en vian gepatran lingvon.  
 D. Respondu al jenaj demandoj:

Ĉu la kuirejo estas malgranda? Kia estas la kuirejo? Kio estas en la kuirejo? Ĉu la kuirejo estas varma? Ĉu la forno estas varma? Sur kio kuiras la patrino? Kio brulas en la forno? Ĉu la familio estas en la kuirejo? Kie estas la patrino? Ĉu la patrino laboras en la ĉambro? Kie ŝi estas en la mateno? Ĉu ŝi tiam kuiras? Kie ludas la infanoj post la tagmanĝo? Kie estas la patro?

## LA OKA LECIONO.

- |                 |                   |             |
|-----------------|-------------------|-------------|
| 22. termometro  | 29. polvo-sako    | 36. rubando |
| 23. sitelo      | 30. kulerego      | 37. fundo   |
| 24. lav-kuvo    | 31. kulereto      | 38. rato    |
| 25. kuveto      | 32. kaserolo      | 39. karafo  |
| 26. verŝujo     | 33. pato          | 40. anso    |
| 27. broso       | 34. kuirejo-tablo | 41. tubo.   |
| 28. polvo-broso | 35. kaheloj       |             |

La varmo de la **suno** — La varma suno — La suno estas varma.

La suno estas bona — La suna **vetero** — La vetero estas suna.

La ĉarmo de la knabino — La ĉarma knabino — La knabino estas ĉarma. La papero sur la tablo — La papera saketo. La **tago** estas bela — taga **laboro**. La polvo sur la strato — polva strato. La patro estas en la ĉambro — patraj vortoj. La najbaro estas en la **parko** — la najbara **lando**. **Amika** letero. Landa **kongreso**.

**KOREKTO:** Legu en la vortlisto de la sesa leciono („L.J.V. No. 9-32): 27. **funto** (anstataŭ funelo).

## LA RATO.

En la angulo **sidas** rato. Ĝi ne **timas**, ĉar la kato estas **for**. Nun la malgranda besto estas **mastro** en la kuirejo. La pano, butero, lakto kaj sukero bon-**odoras**. La rato estas tre **malsata**, sed sur la ujoj estas kovriloj. La rato estas mal-**kontenta pri la homoj, pepas** kaj pepas, sed tio ne **helpas**. Ĝi **pensas**: „Ni loĝas en la **sama** domo, kaj nur mi malsatas (estas malsata). La **mondo** estas mal-**justa**.” Ĝi **restas** sur la planko kaj ĉirkaŭ-**rigardas**. Sur la kuirejo-tablo estas diversaj objektoj: sukerojo kun kulereto, teujo kun tubo, karafo, kuveto, tranĉilo. Sur la forno staras **fer-poto** kun **viando** kaj **kaldrono** kun akvo. Ankaŭ kaserolo, pato kaj kulerego estas en la kuirejo. Sur la muro pendas raspilo, tondilo, korktirilo, horloĝo, spegulo, kaj termometro. Sub la kuireja tablo estas ŝranketoj. En ili estas multaj **mangajaĵoj**: viando, **legomo**, **ter-pomoj**, fruktoj kaj kukoj. La rato ĝemas kaj diras: „La homoj estas **kruelaj**. **Inter** ili mi ne **deziras vivi!**” Granda bruoj. La rato for-**rapidas**.

- a. Lerne bone la novajn vortojn.
- b. Kopiu la frazojn en vian kajeron.
- c. Traduku la lecionojn en vian gepatran lingvon.
- d. Respondu al jenaj demandoj:

Kie sidas rato? Ĉu la rato timas? Kie la rato estas mastro? Kio bonodoras? Kia estas la rato? Kie estas la kovriloj? Ĉu la rato estas kontenta pri la homoj? Ĉu la mondo estas justa? Kie restas la rato? Kio estas sur la kuireja tablo? Kio estas en la sukerojo? Kio estas sur la forno? Ĉu en la teujo estas kulereto? Ĉu en la kaldrono estas viando? Kie estas la viando? Ĉu estas teo en la sukerojo? Kio pendas sur la muro? Ĉu la karafo pendas sur la muro? Kie estas la tranĉilo? Kio estas en la ŝranketoj? Ĉu la kuveto estas en la ŝranko? Ĉu la terpomoj estas sur la forno? Ĉu la kaldrono estas sur la forno? Kie estas la legomoj?

---

La „Fundamenta Krestomatio” troviĝu en la manoj de ĉiu vera Esperantisto. Ĝi estas unu al la plej gravaj verkoj, kiun ĉiu konu.

Prezo (afr.): broŝ. 1,65 guld., kartonbind.: 2,10 gld. Mendebla ĉe la red. de „La Juna Vivo”.

## KION DIRAS LA GAZETARO PRI „L.J.V.”

„**La Semanto**” (Jan. '36): „Antaŭ ni kuŝas la decembra numero de „La Juna Vivo”. Kvankam multaj el ni konas ĉi tiun interesan gazeton, ni juĝas necese ankoraŭ paroli pri ĝi, por ke **ĉiuj** ĝin konu.

Per instruaj noveloj kaj rakontoj, vortproblemoj efikaj por spirit-gimnastiko, per stilo plaĉa kaj klara, „La Juna Vivo” montriĝas daŭre altnivela, kleriga revuo, ne nur por infanoj, sed ja por ĉiuj plenkreskuloj. Kaj — ni tion diru plensincere — la plej grava kvalito de „L.J.V.” estas, ke ĝi, krom la supre nomitajn ecojn, havas tiun de profunda humaneco. Nek bruaĵ, nek emfazaj deviz-vortoj kreas ĝin, sed io pli valora: La vortoj simplaj, kiuj tuŝas la koron, la moralon de la leganto kaj igas lin pripensi, trovi la homecan fundon mem. Jen, laŭ ni, la plej bona metodo por humaneca edukado. Per sia malalta prezo „La Juna Vivo” estas akireblaj de ĉiuj.”

La red.ino M. MEVO.

„**De Jonge Wacht**” (No. 25, 21 Mrt. '36): „Voor hen, die zich practisch willen oefenen (kruiswoordpuzzles, liedjes, thema's, enz.) kan ik aanbevelen de ingenaaiide jaargang 1934-1935 van „La Juna Vivo”. 196 bldz. mooie druk, duidelijke illustraties. Prijs f 0,75.

„**Informoj**” (Jan. '36): „..... La gazeto prezentas el si bonan lernilon por komencantoj, helpilon por progresantoj kaj legomaterialon por kiu ajn. Ĝi havas por ĉiu sian fakon, precipe la junularon ĝi instigas al fervora laborado por perfektigi en la lingvoscio. La redakcio scipovas variigi la enhavon tiel, ke ĝi fariĝos nek unutona, nek enuiga por la legantaro. Jen premirakontoj laŭ la bildoj, jen ludoj, jen kantetoj kun muziknotoj, jen enigmoj, krucvortoj kaj aliaj premiotaskoj, jen ŝercetoj, anekdotoj kaj multo alia. Krom teksto enestas multaj ilustraĵoj. Ankaŭ rilate al la lingva flanko ne multo estas riproĉebla: kelkaj malgravaj preseraretoj, iuj aliaj pridisputeblaĵoj, sed ĝenerale ĉio plene kontentigas. Do pluan kaj plian sukceson al la plaĉa junulargazeto!

„**Informilo Ned. Esp. Gruparo**” (Febr. '36): „La Juna Vivo”, la sola porinfana gazeto tute verkita en Esperanto. La redaktadon faksperite prizorgas S.ino v. Veenendaal. La enhavo estas taŭga por komencantoj de dek ĝis cent jaroj!

„**Lingvo Internacia**” (Mei-Dec. '35): „..... kaj tiu verko estas utila ne nur por ĉiu libroamanta Esperantisto, sed ankaŭ por 12-16 jara junularo kaj por komencantoj.

„**Bulteno de Ĉeh. Lab. Esp. Ligo**”: „..... La gazeto aperadas regule ĉiunmonate, ĝi estas facilegebla, precipe destinita por junularo kaj komencantoj. En ĝi troviĝas interesaj rakontoj, anekdotoj, enigmoj kaj instrua parto kun belaj desegnaĵoj. Ni varme rekomendas tiun ĉi vere malmultekostan gazeton.....”

„**Norvega Esperantisto**” (Okt. Nr. '35): „..... La libro — ankaŭ la gazeto — estas tre rekomendindaj. La riĉe variigita enhavo konsistas el fabeloj, rakontoj, anekdotoj, enigmoj, ludoj, poemoj, desegnaĵoj kun instruaj demandoj kaj klarigoj. Menciindaj en la unua jarkolekto estas rakontoj pri Helen Keller kaj fraŭlino Sullivan kaj pri H. C. Andersen. Kunlaborantojn la gazeto havas en multaj landoj. Ankaŭ tradukoj el norvega lingvo aperis.

Se eksterlandanoj grupe abonas la gazeton, ili pagas nur la nederlandan abonprezon.

## KORESPONDADRESOJ.

**Al niaj abonantoj:** Ĉiu abonanto aŭ grupo havas la rajton enpresigi unufoje en la jaro senpagan korespondadreson.

**Aŭstrio:** 16 jara fraŭlino dez. kor. kun la tuta mondo. F.ino P. Vogl, Bäckerei, Strasswalchen b. Salzburg.

**Aŭstrio:** 18 jara studento dez. kor. kun gejunuloj el ĉiuj landoj. S.ro J. Asen, Braünaüerstrasse, Strasswalchen, b. Salzburg.

**Germanujo:** 2 junaj Germanoj intencas bicikle travojaĝi dum la sekv. somero okcidentan Eŭropon. Kiuj interesiĝas pri tio skribu al: S.ro G. Miosge, Potsdam, Zeppelinstr. 59.

**Nederlando:** F.ino Neline Blokker, Opperdoes, dez. kor. per poŝtk. il. Certe respondas.

**Nederlando:** Marie Hogendijk, 25 jara, dez. kor. Interesiĝas pri floroj. F.ino M. Hogendijk, Spaarndammerdijk 89 (III). Amsterdamo.

**Nederlando:** Kiu sendas al mi 25 poŝtmarkojn, mi resendos 25 ekz. Adreso: K. de Haan Pzn., (12 jara knabo), West-Grafdijk (N.H.)

**Usono:** 12 jara knabo dez. interŝ. poŝtk. il. k. poŝtm.: Abr. Sirulnick, 589 Hopkinson Ave, Brooklyn, N.Y., U.S.A.

**Usono:** 12-jara knabo dez. interŝ. poŝtk. il. kun ĉiuj landoj. Adreso: Seymour Diamond, 156 Christopher Ave., Brooklyn, N.Y.

**Usono:** 12 jara knabo dez. interŝ. poŝtk. il. kun ĉiuj landoj. Adr.: Lionel Levinson. 200 Christopher Ave., Brooklyn N.Y.

**Usono:** 12-jara knabo dez. interŝ. poŝtk. il. kaj poŝtm. Adr.: Bernard Fishkin, 402 Christopher Ave., Brooklyn, N.Y.

**Usono:** 12-jara knabo dez. interŝ. poŝtm., poŝtk. il., fotojn. Adr.: Lester Yagid, 1800 Pitkin Ave., Brooklyn, N.Y.

**Svedujo:** Ĉiu, kiu volas interŝanĝi poŝtkartojn skribu al: Arvid Persson, Vika St.

**Svedujo:** Kelkaj gekamaradoj dez. kor. kun ĉiuj landoj. Skribu al: K. do G. Svensson, Kvarngatan 9. B., Jönköping. Certe respondos.

**Portugalujo:** Mi volas interŝanĝi kun fraŭlinoj poŝtk. il. Adr.: Fr. A. Rasquinho Junio, Aljustrel, Alentejo.

**Nederlando:** Du junaj Esp. istoj, 15- kaj 19-jaraj serĉas gekorespondantojn. Resp. certa. Jan. Kosmis Jr, Floraweg 33, Amsterdam N.

**Usono:** 12-jara knabo dez. kor. pri ĥemio, interŝ. poŝtk. il., poŝtm., kaj fotojn Paul Molmud, c/o A. Molmud, 567 Prospect Pl., Brooklyn, N.Y.

**Usono:** 12-jara knabo dez. interŝ. poŝtk. il. kun ĉiuj landoj. Alfred Zaldin, 267 Chester St., Brooklyn N.Y., U.S.A.

**Usono:** 13-jara knabo dez. interŝanĝi poŝtk. il. kun ĉiuj landoj. Howard Klein, 411 Watkins St., Brooklyn, N.Y., U.S.A.

**Usono:** 16-jara knabo dez. interŝ. poŝtk. il. kun ĉiuj landoj. Seymour Fleischer, 403 Hopkinson Ave, Brooklyn, N.Y., U.S.A.

**Usono:** 12-jara knabo dez. interŝ. poŝtk. il., ankaŭ poŝtm. Kun ĉiuj landoj. Jacob Abidor, 89—91 Powell St., Brooklyn, N.Y., U.S.A.

**Nederlando:** Mi dez. kor. kun gek. doj en ĉiuj landoj. Respondo certa. J. W. Wouters, Spykerstraat 92, Bussum.

**Nederlando:** La Esperanto-grupo Marssum serĉas gekorespondantojn en ĉiuj landoj. Certa resp. F.ino N. Bouwman, Marssum.

**Svedujo:** Lunds Esperanto-Klubb aranĝos letervesperon meze de Majo. Skribu multnombre al: Hans Petersson, Kitiansgatan 15, Lund.

**Nederlando:** Corrie de Leeuw (14-jara knabino) dez. kor. kaj interŝanĝi poŝtm. k. poŝtk. il. (kun muelliloj). Resp. certa. 't Zand, NH.

**Hispanujo:** 17-jara razisto dez. kor. kun ĉiuj landoj. Resp. certa. Skribu al: B. Vigo, strato Angel Guimera 534, Roses (Kat.).

**Svedujo:** Du junuloj dez. kor. kun gesamideanoj el ĉiuj landoj. Adr.: Gösta Andersson, Box 3, Tibro. Ingemar Svensson, Box 53, Tibro.

**Danujo:** Du junuloj bicikle trapasos sekvajn regionojn: Flensburg, Hamburg, Bremen, Oldenburg, Nederlando, Kolonjo, Mainz, Nürnberg, Passau, Vieno, Praha, Dresden, Berlino, Hamburg, Gesamideanoj, kiuj dez. mallongan viziton de ili, skribu tuj al: V. Iversen, Edslev, Ormslev.

**Nederlando:** F.ino A. Reuvers, 19-jara, Dirkshorn, B 101, dez. kor. pri ĉ.t. (ne politikaj), interŝ. poŝtk. il, poŝtm., fotojn. Certe resp.

**Nederlando:** S.ro J. Boddeman, Adadwarsstr. 4, Almelo, dez. interŝ. p.i. kaj p. m. Al ĉiu, kiu sendas al mi 100 aŭ pli da p. m. el sia lando, mi sendos la saman kvanton de mia lando.

### KOMUNIKOJ PRI LA GAZETO.

1. Esperantistaj grupoj en jenaj lokoj enkondukis „L.J.V.”: Barneveld (Ned.), Lottum (Ned.), Marssum (Ned.), St. Nicolaasga (Ned.), Zaandam (Ned.).

2. En jenaj gazetoj aperis artikoloj el „L.J.V.”:

Svensk Vanföre-Tidskrift: „La Vivo sen Manoj” (L.J.V. No. 6(29)). „To-veritar” (Finna Virinrevuo): „Militema Filo” (L. J. V. No. 11).

„De Jonge Wacht”: „La Muelilo” (L.J.V. No. 11).

„Purmerender Courant”: „Higiena trinko” („La Juna Vivo” No. 4-5).

„MLádi” (Ĉeĥa gazeto): „Vintro” (L.J.V. No. 4-27); „Pri la viro, kiu fariĝus vilaĝestro” (L.J.V. No. 4-27).

### KORESPONDADO.

M. en Diĵon (Franc): La monon ni ricevis. Koran dankon.

H. en H. (Ned), F. en A. (Ned), M. en S. (Dan), G. en D. (Germ):

Provizore ni ne povas enpresigi viajn kantojn.

M. en S. (Dan), F. en A. (Dan), G. en L. Ch. du B. (Franc), L. M. en B. (Hung), C. I. en H. (Ned), v. I. en R. (Ned): Komunikoj pri radio-disaŭdigoj, ekspozicioj, int. esp. kunvenoj, konkursoj, ktp. ni nur malofte povas enmeti en „L.J.V.” La gazeto perdis tiel sian karakteron.

G. en J. (Jugosl): La rakonto ne estas sufiĉe interesa.

L. en Bourneville (Angl): Via enigmo estas tro malfacila.

H. en Z. (Pol): Ne sufiĉas.

B. en D. (Germ): La enhavo ne plaĉas al ni.

**Recenzoj:**

**Kudlago, la malgranda eskimo.** De N. v. Hichtum. El la holanda lingvo tradukis S. D. Mannoury. Eld. Soc. Esperanto, Stokholm, Mendebla ĉe la redakcio de „La Juna Vivo”. 40 paĝ. Prezo 0,30 gld.

Jen libreto por junuloj kaj komencantoj, kiun ili kun ĝojo kaj utilo legos. La simpla reala rakonto (**verkita antaŭ 40 jaroj**) pri la simpatia eskima bubo Kudlago vekos nian simpatian por li kaj lia popolo. La leganto ekscias multon pri la vivado kaj moroj ĉe la eskimoj, ni vidas kiel Kudlago ĉasas fokojn kaj ursojn, kiel li kaj lia patro konstruas boaton kaj sledon, kiel ili batalas kontraŭ neĝo kaj glacio, frosto kaj ŝtormo, sed ankaŭ kiel ili kun siaj najbaroj ĝojas kaj festas.

Tamen brile la verkistino pentras la amon kiun havas la eskimoj al sia, laŭ nia opinio malagrable, lando. Kudlago ne volas forlasi ĝin por veturo al pli sudaj landoj, ĉar li ne volas malhavi la ĝojon, kiun donas al li ĉasado, aŭ la frandaĵon, kiun reprezentas la graso de ĵus kaptita foko.

La stilo estas simpla, kaj ni plene povas rekomendi la libron al komencantoj, kiel ankaŭ al pli lertaj esperantistoj, kiuj deziras sin distri per legado de interesa rakonto.

**Libervola Civila Helpservo Internacia** eldonis tre belan broŝuron. La broŝuro klarigas la celon kaj la ĝis nun faritajn laborojn de la nomita Helpservo. La libreto estas 16-paĝa, presita sur bonkvalita papero, kaj enhavas belajn fotojn. Kiu interesiĝas pri la broŝuro povas mendi ĝin kontraŭ unu respond-kupono ĉe: Julio Gilliard, rue des Granges, Neuveville (J.B.), Svislando. (Oni ankaŭ helpas, sendante eluzitajn poŝtmarkojn.)

**LEGU EN ESPERANTO**  
**„GAJA KNABO”**

(tre taŭga libro por komencantoj)  
Verko de la fama norvega Nobel-premiito **Bjørnstjerne Bjørnson**. Esperantigita de Liv Sandberg kaj Dordi Johansen.

La prezo estas nur f 0,60 (afrankite)  
Mendebla (kontraŭ antaŭpago) ĉe:  
Norv. Esp.ista Ligo, Librofako, Skapelsgate 5, Hamar, Norvegujo, aŭ ĉe la red. „La Juna Vivo”.

**ESPERANTAJ HISTORIETOJ I**

de P. Frey.

La libro enhavas rakontetojn en tre simpla lingvo. Post komenca kurso ĉiu povas legi ĝin. 2500 libroj vendiĝis dum 7 monatoj. Prezo 0,40 ct. Mendojn peras „La Juna Vivo”.

**NORVEGUJO:**

**LEGU!!!**

**LA LUMTURO DE ESPERANTO**  
(Le Phare de l'Esperanto)

Monata, Sendependa organo.  
Multe da artikoloj estas en franca kaj esperanta lingvoj. Jarabono 10 fr. fr.  
Redaktejo, Villa Zamenhof, Sisteron.  
(B—A)

**FRANCLANDO**

**PAŜO POST PAŜO.**

Een volledige Esperanto-leergang  
J. W. Minke en F. Boom-de Vries  
1ste deeltje (150 pag.) ..... f 0,75  
2de deeltje (208 pag.) ..... f 0,95

Verschenen bij:

N.V. Uitgevers Mij.  
C. A. J. van Dishoeck

**Verkrijgbaar bij de redactie van**  
**„La Juna Vivo”.**

(en bij de erkende boekhandelaren).

**JARKOTIZO:**

Ameriko: 0,70 dol.; Aŭstrio: 3,20 ŝil. Britujo: 3 ŝil.; Belgujo: 17 fr. fr.; Bulgarujo: 50 lev.; Ĉeĥoslovakujo: 16,50 Kĉs.; Danujo: 3 kr.; Estonio: 2,50 est. kr.; Finnlando: 30 finn. mk.; Francujo: 10 fr. fr.; Germanujo: 1,75 M.; Hispanujo: 5 pes.; Italujo: 8,3 ital. lir.; Japanujo: 2,50 jap. jen.; Jugoslavio: 30 din.; Latvio: 2,1 l.; Norvegujo: 2,7 kr.; Polujo: 3,6 zl.; Portugalujo: 15 port. esk.; Svedujo: 2,70 kr.; Svisujo: 2,1 sv. fr.

**La Sepa Flandra Kongreso de Esperanto** okazos en Gent, 30 Majo-1 Junio. Multaj rabatoj por eksterlandaj vizitantoj. Oni petu informojn ĉe la Organiza Komitato, Raapstraat 82, Gent. Ĉiuj samideanoj bonvenaj.

**15 jaroj.**

La **INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO** (oficiala organo de T. A. G. E.) ĵus eniris la 15an jaron de sia ekzistado.

Ĉu vi komprenas la signifon de tio? Tio ja atestas, ke I. P. R. rajte ludas sian rolon en la esperanta gazetaro.

**Ĉu ankaŭ por vi?**

Se ne, konatiĝu kun ĝi kaj petu tuj senpagan specimemon al la administranto:

P. KORTE,  
Schoolstraat 13  
VEENDAM  
(Nederlando).

**BONVOLU SENDI LA MONON POR „LA JUNA VIVO“:**

*Ameriko:* Amerika Esperanto-Instituto, Madison, Wisc. Usono.

*Anglujo:* The British Esp. Asociation, Inc. 142 High Holborn, London W.C.I.

*Aŭstrio:* S.ro Scheibenreiter, Hermannsgasse 31/26, Wien VII.

*Belgujo:* Hendrik Rainson, Mechelen, Belga ĝironumero 335183.

*Ĉeĥoslovakujo:* L. J. Svoboda, Plzen „U Zvonu“, ĝironumero 14171 Praha.

*Danujo:* S.ino M. Jensen, Galtrup, Erslev, ĝironumero 44593.

*Estonio:* Esperanto-Asocio de Estonio, Tallin, Poŝtkast 6.

*Finnlando:* Esperanto-Instituto de Finnlando, Kluuvikatu 5, Helsinki.

*Francujo:* S.ro Matthieu, Dijon, 27, Place de la République, Côte d' Or.

*Germanujo:* Ewald Killmer, Schwabenweg 14, Wuppertal-Elberfeld. Germana ĝironumero: „Köln 104097“.

*Japanujo:* S.ro Joshy H. Ishiguro, Daita 2—784, Setagaja, Tokio. Poŝtĉekkonto: Tokio 62061.

*Jugoslavio:* Vilim Buk, Knjiĝotiskara, Sl. Brod. Ĉeko Nro. 37.556.

*Latvuj:* Ludmila Jevsejeva, Riga, Reformiatoru, iela 14, dz. 5.

*Norvegujo:* Norvega Esp.-Ligo, p/a S.ro G. Johannessen, Skappelsgate 5, Hamar.

*Svedujo:* John Karlsson, Berga, Vasterhaninge. Sveda ĝironumero 72295.

*Svisujo:* S.ro R. A. Dasen, 19a Avenue Riant-Parc, Genève.

Oni povas pagi per eksterlanda poŝtmandato, **7 poŝtrespondkuponoj**, ĝironkonto, aŭ papermono en letero. Informiĝu en la poŝtofacejo, kio estas la plej malkara.

Subtenu **La Junularlaboron**, mendu viajn librojn ĉe le redakcio de „La Juna Vivo“! (Petu senpagan libro-liston!!)

**KURSGVIDANTOJ!!!**

Vi deziras por viaj lernantoj mal-  
karan, praktikan esp. lego- kaj lernoli-  
bron?

Mendu tuj la unuan, binditan jarko-  
lekton de „**La Juna Vivo**”, (200 paĝa  
libro en arta kovrilo). La prezo estas  
nur: 1,6 Sv. fr. = 0,75 gld. Grupoj  
kaj abonantoj ricevas rabaton.

**SKOLTA ESPERANTISTA LIGO.**

Ĉi-jare la tendaro okazos en la fino  
de Julio ĉe la angla urbo Ipswich, kaj  
la aranĝantoj certe faros ĉion eblan  
por doni al la partoprenantoj agrablan  
kaj memorriĉan estadon en Anglujo  
inter skoltfratoj el la tuta mondo. Plu-  
ajn sciigojn pri la tendaro donas or-  
ganiza komitato, adreso: 54, Constable  
Road, Ipswich, Suffolk, Anglujo.

**NEDERLANDA ESPERANTO  
KONGRESO.**

**dum Pentekosto (30-31 Majo, 1 Junio  
'36 en Leeuwarden.**

Petu aliĝilojn aŭ plurajn informojn al  
la sekretariino de la L. K. K.,

**Fino Laverman, Molenpad 69,  
Leeuwarden.**

Ĉiu esperantisto estos bonvena, kian  
ajn religion aŭ politikan konvinkon li  
havas.

**EL DUNKERQUE:**

Interkonsente kun la Brita Esp. Asocio,  
okazos de la 4a ĝis la 12a de Julio  
1936 en Malo les Bains apud Dunker-  
que (Nord Francujo), Internacia So-  
mera Restado kun partopreno de 40  
britoj, de nederlandanoj, belgoj, fran-  
coj, ktp. Por ĉiuj informoj skribu al:  
Esperanto, Dunkerque.

**REKLAMTARIFO:**

**1 paĝo: 15 gld.; ½ paĝo: 8 gld.; ¼  
paĝo: 4,5 gld.; ⅓ paĝo: 2,5 gld.**

**„IDEALA ESPERANTO  
BIBLIOTEKO”****eldonas:**

BLUA SANGO ..... Willy Wood.  
LA MOREA PERLO ..... D. Simson.  
IRISIS ..... H. 't Sas.

SUB LA VITRA

KUPOLO ..... L. v. Weddingen.

**Ĉiuj interesaj romanoj, 200 p.**

**Prezo nur po f 0,50.**

(plus f 0,20 por sendkosto).

Aĉetante la 3 unuajn ekz. oni pagas  
nur f 1,35 (f0,60).

**Mendu viajn librojn ĉe la redakcio  
de „La Juna Vivo”!**

La Esperantistoj revis havi gazeton  
redaktatan de profesiaj ĵurnalistoj  
Ilia revo efektiviĝis!

**Aperis:****NIA GAZETO**

- o Monata.
- o La plej malkara.
- o Grandformata. Ilustrita.
- o Internacia kunlaborantaro.

Ĉefredaktoro: S. Grenkamp-Korn-  
feld.

Abonprezo: fr. fr. 15 = 1,5 guld.

Adreso: 29, Avenue de la Victoire.  
Nice, Francujo.

**INTERNACIA ESPERANTO  
ALTLERNEJO „KORNMOD”,  
SILKEBORG, DANLANDO.**

3-monata kurso de 3. majo ĝis 31 Ju-  
lio 1936. De 10. ĝis 19. kaj de 22. ĝis  
31. Julio du specialaj internaciaj kur-  
soj. En la 10-tagaĵaj feriaj kursoj prele-  
gos universitataj profesoroj kaj emi-  
nentaj ekster- kaj enlandaj esperantis-  
toj.

Bonvolu peti programon kaj detalaĵojn  
ĉe: Lernejestro Stig B. Skole, Silke-  
borg, Danlando.